# Vizaĝo kaj etiko*

Marito Sato†

### Pri la filozofio de Emmanuel Lévinas

La juda filozofo Lévinas naskiĝis en Litovujo kaj poste fariĝis franca civitano. Li havas freŝan vidpunkton, el kiu li povas radikale kritiki la eŭropan filozofian tradicion devenantan de antikva Grekujo. Oni povas vidi en lia pensado la kritikon kontraŭ la helenisma tradicio el juda aŭ hebreisma starpunkto. Tio igas lian filozofion tre interesa. La karakterizaĵo de lia pensado konsistas en la insisto pri la etiko. Li asertas, ke la unua filozofio estas etiko, dum por tradicia eŭropa filozofio la unua estas ontologio. Kvankam lia takso ankoraŭ ne estas fiksita, laŭ mia opinio, estas konvene lin ensituigi en la ekzistencialisman skolon. Oni povus do karakterizi lian filozofion kiel etikan ekzistencialismon. Mi deziras trakti la teorion de la egoismo kaj aliulo-centrismo, kiuj troviĝas en lia filozofio.

Laŭ Lévinas la eraro de la tradicia eŭropa filozofio konsistas en tio, ke ĝi metas absolutan valoron sur la spontanecon de la subjekto, t.e. de la mio (aŭ egoo). Kaj Lévinas reliefigas, per analizo de la subjekto, ĝian egoisman karakteron. La libera mio, la sendependa subjekto, kiu posedas kaj utiligas aĵojn kaj ilin racie ekkonas — tio estis kaj estas la absoluta bazo en la eŭropa filozofio. Sed Lévinas vidas en tiu ĉi libera kaj sendependa subjekto aŭ mio egoismon kaj ĝian perfortecon. Ni sekvu lian teorion pri la egoismo.

Unue imagu al vi, kiel specon de penseksperimento, staton, en kiu mio estas, kia ĝi estas. Oni povus eble nomi ĝin animala aŭ infana mio. Ĉe tio temas pri stato, en kiu oni ĝuas donitaĵojn senpripense. Tio estas en iu senco pura kaj feliĉa stato. Tie ne estas malico, ne ekzistas ja eĉ la konscio pri bono kaj malbono. Vivo naive kontenta, vivo trempiĝanta en paradiza ĝuado sen tempo kaj zorgoj, kvazaŭ Adamo en Edeno — jen la estmaniero de origina mio. Atentu, ke tie ekzistas nenia aliulo aŭ alio en aŭtentika senco. Estus ja aliaj homoj kaj aĵoj, sed ili ekzistas nur kiel objektoj de bezono kaj ĝuado, ne kiel sendepende aliaj. Por tiel diri, ĉiuj aliaj estaĵoj, t.e. la mondo, ekzistas kiel "nutraĵoj", por vivo de la mio. Tio estas ĝuste egoismo. Se Lévinas parolas

*Prelego prezentita en la Kongresa Universitato de la 74a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, la 29an de aŭgusto 1987 en la Ŝtata Domo de Edukado, Tokio

†"Le Marengo", appartement 28, 16, rue Schnitzler, 67000 Strasbourg, Francio





pri "egoismo", li uzas la vorton ne en nura riproĉa senco, sed kiel filozofian kategorion.

Ekzistmanieroj de la mio sur pli altaj niveloj estas esence samaj. Ekzemple ankaŭ por mio, kiu utiligas, prilaboras kaj posedas aĵojn, principo kaj esenco estas: "por mi". Ankaŭ por tia laboranta mio, aliaj aĵoj kaj aliaj homoj estas ankoraŭ objektoj de bezono kaj ĝuado. La mio ekiras de si kaj revenas al si kiel la sama mio, ne sciante pri la alieco de aliaj estaĵoj. Lévinas eksplikas la egoisman estmanieron de mio per metaforo de "domo" kaj "loĝado". Nome la mio ne nur ekzistas, sed loĝas en la mondo. Per ĝia loĝado la mondo fariĝas la "domo" de la mio. La mio regas kaj administras la domon kiel mastro. Tiu ĉi metaforo signifas sintenon vidi la mondon kiel "mian mondon", t.e. ĝi signifas egoisman sintenon, kiu volas internigi ĉion en la "mian mondon" kaj igas ĉion objekto de ĝuado. La egoismo ne vidas eksteron, ja tute ne aprobas ion eksteran. Interneco sen ekstereco — jen la karaktero de la egoismo. Se diri tiuokaze, Lévinas aplikas la koncepton "ekonomio" al diversaj situacioj kaj montras agojn de la mio kiel ekonomiajn. Oni komprenu la vorton "ekonomio" en lia penso ne nur en sociscienca, sed ankaŭ en etimologia senco. Se oni interpretas ĝin reirante al greka lingvo, la vorto "oikonomia", respondante al "ekonomio", estas kunmetita vorto el "oikos" kaj "nomos". "Oikos" signifas "domon", kaj "nomos" signifas "leĝon" aŭ "administradon" aŭ "regadon". Nome ĉe la ekonomio temas pri regado de la domo, mastrumado. Do la koncepto "ekonomio" origine entenas la elementon de egoismo, kiu konsistas en regado de la domo t.e. de la mondo.

Cetere oni povas rekoni egoisman karakteron ankaŭ en ekkonanta mio, t.e. en la racio. Ĉar ĉe la ekkono oni povas paroli pri intelekta posedo. La ekkonanta mio interniga ĉion kiel konon en la konscion aŭ en la mondon de ideoj. La pozicio de pura ekkono estas ankaŭ interna, imanenta kaj sen ekstero. Kaj la racio reĝas en sia mondo kiel la absoluto. La kritiko kontraŭ la racio fare de Lévinas rilatas al la tuta historio de la eŭropa filozofio, precipe al la germana idealismo, kies perfektiginto estas Hegel, kaj al la fenomenologio de Husserl, de kiu Lévinas mem estas forte influita (li mem estas unu de fenomenologoj). Ni povas pensi ankaŭ pri devojiĝinta sciencismo, kiu volas ĉion racie aranĝi kiel intelekte kapteblan objekton.

Unuvorte la mio volas resti en la interneco. Lévinas nomas ĉi tiun internecon "totaleco". Totaleco signifas en tiu ĉi okazo fermitan mondon aŭ sistemon. La mio ĉiam formas al si unu totalecon, en kiun ĝin integras ĉiujn estaĵojn. Ĝi havas instinktan tendencon stari sur la absoluta starpunkto, de sur kiu ĝi povus ĉion superrigardi. Estas grave, ke en la totaleco ĉiuj aliaj estaĵoj jam ne estas memstaraj aŭ sendependaj, t.e. la alieco de aliaĵoj estas prirabita. Nun la absolute alia estas alia homo, Aliulo. Kaj oni povas diri, ke en la totaleco Aliulo perdas sian esencon, sian personecon, ĉar lia alieco estas prirabita. Sub "totaleco" ni povas kompreni diversajn aferojn: individuan idemondon, nacion, ŝtaton, dogmisman pensadon, historion kiel sistemon, ktp.

Totalisma sinteno, kiu egale troviĝas en tiuj ĉiuj aferoj — tion celas la kritiko de Lévinas. Totalisma perforto konsistas en tio, ke oni ne rigardas Aliulojn kiel sendependajn, personecajn, alivorte, en tio, ke oni forprenas la personecon de Aliuloj. Ni devas strikte interpreti la koncepton "Aliulo". Ĉar Aliulo estas "alia", tial li havas transcendecon. Li transcendas la regsferon de la mio. Aliulo estas transe, kiel netuŝebla. Transe de la totaleco, t.e. ekstere, li estas. Aliulon, kiu prezentiĝas de ekstere, de transe, nomas Lévinas "vizaĝo". Fronti kontraŭ Aliulo kiel vizaĝo, aŭ rigardi Aliulon kiel vizaĝon, estas, stari en etika rilato. La termino "vizaĝo" sendube devenas de la Malnova Testamento, en kiu ĝi estas uzata rilate al Dio kaj homo, kaj esprimas personecon kaj personecan rilaton. Lévinas denove prenis tiun ĉi religian vorton por la etika kampo. En la etika rilato la sinteno de la mio devas renversiĝi. La mio devas, ne interniĝi la Aliulon en sian mondon, sed iri mem eksteren, t.e. transcendi al la Aliulo. La movoforton de transcendado nomas Lévinas "metafizika deziro". "Metafizika deziro" signifas, ke la mio afekciiĝas, ŝokiĝas kaj altiriĝas de la Aliulo. Renkonto kun la Aliulo igas la mion eksteren iri el sia sekura zono. Laŭ Lévinas, la mio ekvojaĝas el sia domo, sen iam reveni.

Tiele Lévinas reliefigas la mion vid-al-vide kun la Aliulo, jam ne havantan povon super la Aliulo, alivorte, la pasivecon de la mio en rilato kun la Aliulo. Se ĉi tie estas menciataj kelkaj ekzistencialismaj filozofioj, ekzemple Sartre, kiu ekstreme insistas pri la aktiveco de la subjekto, antipode staras kontraŭ Lévinas en tiu flanko — kvankam en aliaj flankoj ili proksimiĝas unu al alia; kontraŭe, ekzemple ĉe Martin Buber, Gabriel Marcel kaj Karl Jaspers troviĝas nemalmulta meditado pri la pasiveco. Sed Lévinas metas maksimuman emfazon sur la pasivecon de la mio. En la etika rilato la ĉefpunkto estas la Aliulo, kaj tial ĉio devas esti komprenata de la Aliulo. En tiu ĉi senco, ŝajnas al mi, oni povas nomi la etikan pensadon de Lévinas radikala aliulo- centrismo. Ni sekvu sube lian pensadon laŭ tiu ĉi vidpunkto.

Kompreneble la rilato de mio al la Aliulo ne estas simpla. Oni povus elpensi senfine multajn konkretajn modalojn. Ĉi tie mi prenas du fundamentajn modalojn de la mio, pri kiuj Lévinas impresege parolas. Laŭ Lévinas, kvankam la Aliulo ekzistas unuflanke kiel radikale malforta, sed tamen aliflanke li estas dotita per certa superreganta majesteco. Unue oni povas diri, ke la Aliulo estas malforta, en tiu senco, ke li staras en danĝero per sendefenda elmetado de nuda vizaĝo. Tio estas ja metaforo, sed samtempe konkreta fakto. La mio povas fornei la Aliulon kiel vizaĝon, lin ofendi, hontigi, damaĝi, vundi, kaj fine eĉ mortigi. Nome eblas senigi la vizaĝon de la Aliulo. "La Aliulo estas por mi mortigebla" — sub tia ekstrema problemo-prezentado Lévinas reliefigas malfortecon, mizerecon kaj povrecon, kiujn la Aliulo esence havas. Lévinas esprimas tian malfortecon per jenaj, en Biblio troviĝantaj vortoj: povrulo, fremdulo, vidvino, orfo, ktp. Entute la Aliulo estas senforta antaŭ la egoisma perforteco de la mio.

Eble vi surpriziĝas je tia en iu senco ekscesa argumento. Sed Lévinas havas





sian propran kialon kaj neceson diri tion. Unu el bazoj de lia filozofio estas meditado pri la rilato inter milito kaj moralo. Li havas, kiel judo, kruelajn travivaĵojn pro la naziismo. Liaj ĉiuj familianoj estis mortigitaj en koncentrejo en Litovujo kaj li mem pasigis dolorajn jarojn kiel militkaptito. Sur la grundo de lia filozofio vivas pripensoj pri milionoj da samnacianoj, de kiuj en naziaj koncentrejoj, estis forprenita la personeco, t.e. la vizaĝo. Tiu sperto konsistiĝas lian etikan pensadon. Do la diroj pri la vizaĝo kaj pri la perforto, kiu ĝin forprenas, neniam estas nura abstrakta argumento, sed tre freŝa problemo.

Nun aliparte Lévinas diras jene: "samtempe la vizaĝo estas tio, kio malpermesas al ni mortigi." Nome la Aliulo rezistas kontraŭ la egoisma perforto kaj minaco de la murdo. Ne per fizika forto, sed per "etika rezisto". Tio ĉe estas speciala rezistpovo, kiun elmontras la vizaĝo, kaj kiu, ĝuste pro ties sendefendeco, paralizas la forton de la mio. En tio troviĝas religio-filozofia aserto de Lévinas. Ĉar li diras, ke el la vizaĝo de la Aliulo elparolas la ordono de Dio: "Ne mortigu". Kiel vi scias, la vorto "ne mortigu" estas unu el la dek ordonoj, t.e. dekalogo, en la Malnova Testamento. Se la malforteco de vizaĝo de la Aliulo esprimas petegon: "mi petas, ne mortigu min!", tiu ĉi petego estas identa kun Dia ordono: "ne mortigu". Malforteco estas forteco. La penso de Lévinas, ŝajnas al mi, lerte klarigas la fakton, ke oni povas mortigi kaj samtempe ne povas mortigi. Ekzemple, kiel ofte dirate, eĉ sur batalkampo estas malfacile mortigi malamikon rekte rigardante lian vizaĝon. Ekzistas en la vizaĝo iu forto, kiu al ni agas.

Se tiuokaze priparoli pri la problemo de Dio ĉe Lévinas, li jesas la eston de personeca Dio, nature kiel judisto. Sed por li Dio estas forestanta, ne renkontebla, transe estanta Dio. Dio parolas nur per la vizaĝo de la Aliulo. En tiu ĉi senco la vizaĝo estas postsigno aŭ spuro de Dio. Laŭ mia opinio, oni povas interpreti, ke Lévinas provas redukti religion al etiko. Ekzemple li diras, ke la etiko nekontesteble regas la tutan Biblion, kaj ke la etika vero estas (por ĉiuj homoj) komuna. Tiaj vortoj ŝajnas permesi diritan interpreton.

Post ĉio la Aliulo, malgraŭ sia senforteco, frontas kontraŭ la mio kun majesteco. Lévinas volas montri la superecon de la Aliulo. La Aliulo estas laŭrange ĉiam pli alta ol mi — tion li volas diri. Fakte li diras jene: "La Aliulo alproksimiĝas al mi de alte. Sur la etika nivelo la Aliulo kaj mio staras en nesimetria rilato kaj mio subordigiĝas sub la Aliulo. Ĉe la centro staras la Aliulo kaj ĉio komenciĝas de la Aliulo. Ĉar la subjekto fariĝas personeco nur per la renkonto kun la Aliulo, kaj tial la direkto kaj senco de ĝiaj agoj dependas de la Aliulo. Lévinas diras, ke "subjekto" signifas. laŭ sia latina vortsenco, "subĵetito" t.e. "sub-estanto", "sub-staranto", "sub-Aliulo- staranto". Unuvorte, subjekto estas dependanto de la Aliulo. Ĉi tie ni vidas perfektan renverson de la tradicia koncepto de subjekto. Ĉar, tradicie, ĉe la vorto "subjekto" temas pri "sub-staranto" en tute alia senco, t.e. "sub-staranto" kiel centra subtenanta ĉion alian. Do ĉe Lévinas aperas, anstataŭ egocentrismo, radikala aliulismo aŭ heterocentrismo aŭ Aliulo-centrismo. Oni apenaŭ povas trovi alian pensadon,

kiu emfazus pasivecon de subjekto ĝis tia grado.

Konsideroj pri la supereco de la Aliulo estas profundigataj laŭ vidpunkto de la respondeco. Lévinas diras, ke la subjekto estas metita en situacion, en kiu ĝi devas preni sur sin la respondecon por la Aliulo sen scii pri la origino kaj kialo de tio. Ĉe "respondeco" temas pri tio: ekzisti kontraŭ la Aliulo por respondi. Do la rilato mem al la Aliulo estas respondeco, kaj tial subjekteco estas identa kun respondeco. Kvazaŭ la mio estus kaptita de la Aliulo. En tiu senco Lévinas diras, ke la subjekto estas "ostaĝo". La vorto ostaĝo, kvankam stranga, esprimas lerte la aferon. Plue antaŭenirante, Lévinas starigas jenajn demandojn, la plej seriozajn: "Ĉu mi havas rajton esti?", "Ĉu mi, estante en la mondo, ne prenas la lokon de iu?", "Ĉu mi, estante, ne mortigas?" Germana filozofo Martin Heidegger, pri kies filozofio Lévinas ĉiam konscias intencante ĝin transiri, starigis, kiel baza demando de la metafiziko, jenan demandon: "Kial ĝenerale estas estaĵoj prefere al neio?" Tiu ĉi estas ontologia demando, kiu demandas pri kialo de esto de la mondo. Kontraŭe al tiu ĉi ontologia demando Lévinas starigas bazan demandon el etika starpunkto. Ankaŭ ĉi tie prezentiĝas lia sinteno vidi la unuan filozofion ne en la ontologio, sed en la etiko.

Nun la argumento pri la vizaĝo ĉe Lévinas ne limiĝas je malvasta duo-rilato. Lia pensado, surbaze de la vizaĝo, tra konsideroj pri amo, patro-filo-rilato, frateco, ktp., elvolviĝas ĝis la problemo de socieco kaj justeco. La socieco ne konsistas en nura interrilato inter multaj homoj. Tiel longe, kiel la socieco estas personeca rilato, ankaŭ pasejo al ĝi kuŝas en la vizaĝo. Lévinas diras: "La tria persono rigardas min el la okuloj de la Aliulo". "La tria persono" indikas, post ĉio, ĉiujn homojn krom "mi" kaj "vi". Tial Lévinas diras ankaŭ, ke aperado de vizaĝo apertas la homaron. Malantaŭ la Aliulo, kiun, kiel vin, mi rilatas, estas multaj Aliuloj kiel triaj personoj, kaj ilia ekzisto jam estas apertita en la vizaĝo de la Aliulo kiel "vi". Per tio, aŭ surbaze de tio, la mio povas konkrete rilati al multaj Aliuloj. En la situacio de la rilato kun multaj Aliuloj ŝoviĝas antaŭen la problemo de justeco. Sed nun mi ne povas eniri en tiun ĉi problemon. Ĉiuokaze Lévinas antaŭenpuŝas sian etikan meditadon en rilato kun la vizaĝo ĝis la fino.

La pensado de Lévinas, pri kiu mi supre maldetale parolis, eble ŝajnas al vi tre abstrakta kaj stranga. Tio estas kaŭzita de la neebleco reprezenti ĉi tie liajn detalajn fenomenologiajn analizojn. Mi esperis, ke vin interesos lia aliulo-centrismo, kiu, certe iom ekstrema, igas tamen nin pripensi multe. Ĉu ni vere aprobas la aliecon de aliaj homoj kaj de aliaj estaĵoj? Aŭ ĉu ni vere ne estas enfalitaj en egoismon, ne nur sur individua nivelo, sed ankaŭ sur grupa, nacia, ŝtata niveloj? Rigardi la Aliulon kiel Aliulon, rekoni la dignecon kaj sendependecon de aliaj homoj, tio estas ja tre simpla, sed samtempe tre malfacila kaj grava.





# Pri amo ŝi kantis en tempo malamoza

Edmund Rosner

*(La du versaĵojn kaj la roman–fragmenton de A.J.Koenig tradukis Kazimierz Szczurek)*

Esperanto kiel ideologio ĉiam havis karakteron humanisman, tial ĝi ĉiam solidaris kun manifestaĵoj de la humanismo. Ĉi tiu konstato klarigas, kial ni direktas la atenton al verkistino ĝis nun ne konata en la esperanta literaturo, sed meritanta tiun literaturon eniri. Ŝi eniru do tra la centenario de sia naskiĝo (vidu rimarko ĉe la fino de la teksto).

Alma Johanna Koenig (18/07/1887 – 1942), austra poetino kaj prozistino, apartenis al la intermilita viena literaturo. Ŝian nomon oni citis apud la plej elstaraj tieaj verkistoj kiel Felix Braun, Alfred Grünewald, Emil Lucka, kaj komparis al la plej eminentaj reprezentantinoj de la virina literaturo – Anette von Droste–Hülshof, Elizabeth Harriet–Browning, Marianne Alcoforado kaj Lou Andrea–Salome. Ŝia famo apogeis en la dua kaj tria jardeko de nia jarcento, kiam ŝiaj verkoj aperadis originale en Austrio kaj Germanio kaj tradukite en Svedio, Britio, Pollando, Kroatio, Hungario. Tiu famo ne forvelkis ĝis nun, la verkistinon oni omaĝas en Europo kaj Ameriko, precipe kiel bardinon de multnuanca amo.

A. J. Koenig naskiĝis en Prago, kvankam ŝiaj gepatroj devenis el Galicio. En la jaro 1888 ili venis al Vieno, restis pordaure, kaj kun tiu urbo ligiĝis la vivo de la verkistino. Tie ŝi kreskis en burĝa hejmo de reĝa imperiestra oficiro, sorbis etoson de la krepuskanta habsburga monarkio, tie ekkonis literaturan rondon de Felix Braun, debutis en la revuo "Zeit", publikigis siajn ĉefajn verkojn, establis propran hejmon kun barono Bernhard Ehrenfels, travivis kolapson de la edzineco, travivis la mornajn jarojn de la nazia regado, en kiu ununura ĝojiga radio estis la ligo kun Oskar Jan Tauschinski – el tie oni transportis ŝin al koncentrejo en Blankrusia Minsk, kie ŝi pereis. Do,